40 BET Birštonas, Litovio

# Meandro 6

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

*** Vendredo *  2004.07.16**

**HODIAŬ**

### Vendrede , la 16an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo; gvidas Ĉielo)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**09:00-10:00** Hodiaŭa stato de la litova lingvo (P. Čeliauskas, en 204)
**09:00-12:45** Diplomiga seminario de IEI. Gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (salono de urba magistrato)
**09:30-11:00** Paroligaj kaj perfektigaj kursoj (E. Bondar en 200, S.Trenner en VERSMĖ 2)
**10:30-11:30** Renkontiĝo de fotoamatoroj. Gvidas A.Maruška (en 204)
**11:30-13:00** Ekskurso por medicinistoj tra la sanatorioj VERSMĖ kaj TULPĖ. Gvidas A. Maruška (renkontiĝi ĉe registrejo)
**11:30-12:30** Prelego de P.Čeliauskas "Lernolibroj de Esperanto por litovoj, eldonitaj en eksterlandoj" (en 204)
**11:00-12:00** BEF: Prelego de Halina Gorecka "Lev Tolstoj kaj Esperanto" (en 305)
**12:00-13:00** BEF: Diskutrondo pri la tradukliteraturo en Esperanto (en 305)
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**14:00-15:00** Prelego de A.Maruška pri Su-Ĝok metodiko (en salono de apuda domo)
**14;00-15:00** Prelego de T.Grundstrom "Finna literaturo en Esperanto" (en 204)
**15:30-16:30** Diversaj lingvaj ludoj (*por progresintoj*). Gvidas Nora Caragea (en 204). Bv. kunporti SKRIBILOJN!
**15:30-17:20** Diplomiga seminario de IEI, gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (salono de urba magistrato)
**17:00-18:00** Videofilmo "La ora ovo" — spektaklo de Kaŭna pupteatro, en Esperanto (en 204)
**18:00-19:00** VESPERMANĜO
**19:00-20:00** Poezia vespero; deklamado de Esperanto-poemoj. Ŝatantoj de poezio kolektiĝu en ĉambro 305.
**19:00-20:00** Instruado de kantoj; gvidas V.Čojienė (en 204)
**20:00-21:00** LITOVA NACIA VESPERO: koncertas "RASKILA" — ensemblo de popolaj kantoj kaj dancoj (en kulturcentro)
**21:00-22:00** Distra vespero (en apuda domo)

### ATENTON!!!!

**FORVETURO**

Ĉiuj busetoj Birštonas-Kaunas, la 18an de julio, dimanĉon, forveturantaj al Kaunas, haltos ĉe la sanatorio Versme. Busetoj veturas ĉiun duonhoron.

Foririnte ne forgesu redoni ŝlosilojn.

— Organiza Komitato

**BALTA ESPERANTA FORUMO**

La du BEF-aranĝoj hodiaŭ okazos ne en la urba magistrato, sed en la ĉambro 305 de la administreja domo.

**PAROLIGA KURSO de N.Pietuchowska**

Hodiaŭ okazos tuj post la vespermanĝo (en 306)

### NI ATENDAS VIAJN IMPRESOJN

Ĝis kiam viaj impresoj ne forvaporiĝis, fiksu ilin sur papero. Estas interese, kiel al vi plaĉis la ekskurso al Rumšiškės, do kaptu vespere liberan minuton, skribu kaj transdonu al redaktoroj de MEANDRO. Plej interesajn skribaĵojn (aŭ fragmentojn) ni volonte publikigos kaj iliaj aŭtoroj ricevos donaceton.

Ni atendas viajn impresojn ankaŭ pri la tuta BET ĝenerale; ili povas esti publikigitaj ankaŭ sur paĝoj de LITOVA STELO.


## HIERAŬ SUR FOTOJ



▲ Latva vespero kun bonestosa gitarkantado.



▲ Konkurso-kvizo pri la historio de la Esperanto-movado.



▲ Aleksander Korĵenkov prelegas pri "Anton Ĉeĥov Esperanto".



▲ Nora Caragea prelegas pri "Mondfama libro, sed nekonata aŭtoro — Heinrich Hoffmann".

## MARDE SUR FOTOJ




▲ T.Grundstrom rakontas pri "Bremsvagono".



▲ J.Halasz prelegas pri sia patrujo — Hungario.

## NEMUNAS – MIRINDA RIVERO, LITOVIO – MIRINDA LANDO

*(Noktomezaj pripensoj absolute subjektivaj)*



Kiaj povus esti impresoj ligitaj kun observado de iu rivero? Ho, jen tiaj: hela – malhela, granda – malgranda, larĝa – mallarĝa, rapide aŭ malrapide fluanta, nuda aŭ diverskolore vestita per ĉebordaj diversspecaj arboj kaj herboj.

Sed nenion negativan oni povas diri pri la rivero Nemunas, ĉar ĝi estas ĝuste longa, sufiĉe profunda kaj potenca, tre hela pro sennombraj grandaj meandroj, nature pura kaj majesta en sia trankvila fluo, ĉirkaŭita de helegaj diversspecaj arboj kaj herbaĵoj. Ĉu ĉio? Ne, absolute ne!

Ĉar ĉe Nemunas ekzistas ankoraŭ alia miraklo: neimageble nature libera birda reĝlando,

— kie majeste naĝas blankaj cignoj;

— kie multnombre gracie flugadas mevoj kaj anasoj;

— kie ĉeborde senmove staras grizaj ardeoj;

— kie trankvile flugadas blankaj cikonioj k.t.p.

Kaj ĉio tio mirakle harmonias: rivero, verdaĵoj, birdoj kaj, de tempo al tempo, sur- aŭ ĉe-borde malofte videblas fiŝistoj aŭ homoj, iliaj lignaj domoj, kaj tiuj ĉi domoj kaj homoj neniel detruas naturecan harmonion de la river-ĉirkaŭaĵo.

Mirinda lando! Mirindaj homoj! Homoj fieraj pri sia naacieco, pri sia libereco, pri sia kulturo, pri sia lingvo – belege sonanta kaj emociplena. Homoj, kiuj gardas sian kulturon kaj tradiciojn, sian historion kaj sian lingvon, iam severe malpermesitan. Homoj, kiuj profunde ĝuas sian liberecon – iam deprenitan. Homoj, kiuj vidas, kiel majeste ondas ilia mirinda Nemunas.

Ĉio ĉi estas mirinda, pura, majesta, ofte neatendita. Se iu tion ne rimarkis, bedaŭru, aŭ nepre venu venontjare por havi eblecon tion malkovri kaj travivi. Kaj tiam certe vi konstatos, kiel mi nun, ke NEMUNAS estas via amata rivero, ke LITOVIO estas via amata lando.

— *Tadeusz Ejsmont (Pollando)*

## POR PERFEKTECO NE ESTAS LIMO

*(Splitoj de impresoj)*



Fojfoje okazas, ke pli utile estas aŭdi kritikon ol flatan adoradon. Certe, mi ne pretendas al absoluta vero, mi nur volas eldiri kelkaj rimarkojn laŭ mia kompreno.

Pri IKUE kongreso en Kretinga, kie mi partoprenis, mi povas substreki nur altnivelan organizan laboron kaj ĉiutagajn profundajn impresojn. Sed tie, ankaŭ ĉi tie en BET, mi spektis koncerton de infana teatro "Nenuorama" kaj de tio en mia animo restis amara sento. Vere mirinda estis plenumado de dancoj kaj kantoj, sed laŭ mia kompreno por 3-4 jaraj kaj pli aĝaj infanoj tia troa bruego de surbendigita muziko poste influos ilin tiel, ke ili ne kapablos aŭskulti nek aŭdi normalan muzikon. Ankaŭ sveltan kaj ĉarman gvidantinon de la ensemblo mi pli plezure spektus inter gejunuloj ne malpli aĝaj ol 15-jaraj, ĉar inter infanoj la kontrasto estis tro granda.

Kelkaj vortoj pri spektado de videofilmoj. Kvankam ne plene sukcesis ŝirmi tra fenestroj enirantan lumon, tamen estis interese spekti filmon "Litova kalendaro". Bedaŭrinde tion mi ne povas diri pri alia videofilmo "Kaunas – urbo ĉe riverkunfluo". Vere interesan kaj valoran materialon akcepti malhelpis tro rapida transsaltado de unu objekto al la alia, sed ĉefa manko estis tio, ke nur kelkloke mi sukcesis kompreni, ke la akompananta sono estas en Esperanto. Mi ne dubas, ke lingvonivelo estis perfekta, sed tro rapida elparolo malhelpis kompreni.

Vere tio ne rilatas al organiza komitato. Sed certe ĉiuj esperis pli multe da sunaj tagoj. Ni akceptu ŝercojn de Petras, ke la vorto Lietuva estas samradika kun la vorto lietus (pluvo).

— *Jazeps Šlars (Latovio)*

## JEN LA STATISTIKO

Litova proverbo diras: kokidojn oni kalkulu aŭtune, kaj tio estas komprenebla, ĉar dum somero akcipitro povas forkapti kelkajn.

Niaj Baltiaj Esperanto-Tagoj ankaŭ proksimiĝas al la fino, do jam eblas prezenti al vi la statistikon de la aranĝo. Entute en BET-40 ĉeestis 244 personoj el 17 landoj. Laŭ vico de malkreskantaj nombroj la listo aspektas jene:

| | |
|---|---|
| Litovio – 120 | Hungario – 4 |
| Pollando – 43 | Italio – 4 |
| Latvio – 25 | Danio – 3 |
| Finnlando – 13 | Aŭstrio – 2 |
| Estonio – 7 | Francio – 2 |
| Ruslando – 5 | Nederlando – 2 |
| Belgio – 4 | Britio – 1 |
| Belorusio – 4 | Meksikio – 1 |
| Germanio – 4 | |

Ni esperas, ke kun multaj el vi, ni dnove renkontiĝos post unu jaro dum la Universala Kongreso en Vilnius.

— *Organiza Komitato*

## GAZETARO PRI BET-40

Niaj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas sufiĉe vaste priskribitaj en litova gazetaro, radioj, televidoj.

La 13an de julio ampleksan informon pri BET-40 publikigis ĉefa litova gazeto "Lietuvos rytas", la 12an de julio – alia grava taggazeto "Respublika".

La 10an de julio longan artikolon aperigis gazeto "Tëviðkës ŝinios", la 14an de julio – du lokaj gazetoj "Gyvenimas" kaj "Gëlupis"; tiuj du gazetoj aperigos longajn artikolojn ankaŭ venontsabate.

Dufoje (la 9an kaj 11an de julio) informon pri BET-40 disvastigis nacia novaĵagentejo ELTA. Nacia radio kelkfoje la 12an de julio disaŭdigis intervjuon kun Povilas Jegorovas en programo "allegro".

Dum kvar tagoj ampleksa informo pri BET-40 pendis en unu el ĉefaj retgazetoj DELFI.

Solenan inaŭguron de nia aranĝo filmis skipo de kvin regionaj litovaj televidoj (Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai, Panevėžys). Ili venos ankaŭ al fermo kaj faros eĉ kelkajn televid-elsendojn pri la aranĝo.


Baltijos esperantininkų dienos

Ĉiuj litovaj radioj kaj televidoj en novaĵprogramoj informis pri BET-40. Aperos informo ankaŭ en semajna gazeto "Laikas". Certe, ni ne ĉion sukcesis rimarki kaj noti., krome,la informoj estos ankaŭ pli poste. Laŭ tradicio ni antaŭ BET dissendadis longan artikolon pri la aranĝo preskaŭ al ĉiuj litovaj gazetoj, radioj, televidoj k.s. Multaj uzis tiun informon.

—*Povilas Jegorovas*

## LA UNUA LOKO

Dum la jaro 2003 Esperanto-grupo "Pėlemija" de la 5a mezlernejo (urbo Marijampolė) partoprenis en la kvizo-konkurso organizita de la revuo "JUNA AMIKO". Ni sukcesis kaj okupis la unuan lokon kaj ricevis donancon, abonon de la revuo por la jaro 2004.

— *M.K.*

## DU FOTO-EKSPOZICIOJ


▲ Ekspozicio de Ilona Ejsmont pri "Ie malproksime".


▲ Ekspozicio de Andrzej Sochacki pri "E-aranĝoj".



Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok